

Manifestacioj ĝis aŭgusto 1970
Claude Gacond, 342-a radioprelego, 1970.04.29 & 05.02

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni dankas la geaŭdantojn, kiuj esprimis siajn simpation kaj bondezirojn okaze de mia malsano kaŭzita de aŭtomobila akcidento. Ni ne havis la tempon ordigi nian leteraron, pro tio ni evitas mencii nomojn, por ne forgesi iun. Ni dankas tiujn radio-geamikojn kaj reciprokas niajn salutojn.

A.- Kun la varma sezono plivigliĝas la internacia vivo. En multaj lokoj la kursoj finiĝas. Kaj nun oni rigardas eksterlanden farante feri-projektojn. Ni menciu la kongresojn aŭ kulturajn aranĝojn, kiuj povas allogi okcident-eŭropanojn :

Cl.- Post kelkaj tagoj malfermiĝos en Monte-Carlo, Monako, la 2-a Franca-Itala Renkontiĝo. En la programo de tiu manifestacio estas interkona vespero, kunvenoj, distra vespero, vizitoj de muzeoj kaj ĝardenoj, publikaj manifestacioj, diservo en esperanto fare de monsinjoro Jean Rupp, episkopo de Monako, bankedo, ekskursoj al Vallauris kaj Tende. Ni menciu ankoraŭ, ke la francaj fervojoj ĝuigas la kongresanojn pri rabato de 25 procentoj sur la francaj fervoj-linioj. Tiu manifestacio okazos de la 15-a ĝis la 19-a de majo.

A.- Proksimume samdate kongresos la fervojistoj en Rimini, Italio. Datoj : de la 16-a ĝis la 22-a de majo.

Cl.- La junaj esperantistaj paroj estas invitataj en la sama loko por « Miela Luno ». La turisma entrepreno kaj la asocio de hoteletoj de Rimini organizas konkurson nomata « Miela Luno », kiun rajtas partopreni ĉiuj junaj geedzoj, kiuj ne atingos la 25-an jaraĝon antaŭ la 20-a de majo, bone parolas esperanton kaj ne gajnis en pasinta konkurso. La premioj konsistos el 10-tagaj senpagaj restadoj en unua-klasaj hoteloj de la marbordo de Rimini. La restadperiodo estas fiksita de la 26-a de majo ĝis la 4-a de junio. Dum la restado okazos festoj, ekskursoj kaj regaloj honore al la paroj. Ni esperas, ke anonciĝis multaj gekonkursontoj.

A.- En junio okazos en Svislando studsemajnfino pri la geografia nomenklaturado en esperanto. Loko : Gwatt, dato : 13-a kaj 14-a de junio.

Cl.- La 28-an de junio malfermiĝos en la esperantista kastelo Grésillon, Francio, la kulturaj aranĝoj. Dum la somero 1968 400 personoj el 20 landoj restadis en tiu kulturdomo kaj dum la pasinta somero 450 personoj el 14 landoj. Jen la programo por tiu ĉi somero : De la 28-a de junio ĝis la 12-a de julio : seminario por kurs-gvidantoj kaj grup-gvidantoj. De la 26-a de julio ĝis la 9-a de aŭgusto : studoj de esperanto, tri kursoj kaj ekzamenoj. De la 9-a ĝis la 30-a de aŭgusto : kulturaj esperantistaj semajnoj kun diversgradaj kursoj, ekzamenoj, bindado de libroj, korbfarado.

A.- La Internacia Esperanta Ferio-Centro en Volparija, Jugoslavio, ricevas la esperantajn gastojn inter la 1-a de julio ĝis la 31-a de aŭgusto. La pasintan jaron 220 gastoj el 15 landoj ĝuis agrablajn feriojn sur tiu duoninsulo Istrio.

Cl.- De la 3-a ĝis la 6-a de julio okazos la 2-a Esperantista Kultura Festivalo en Opava, Ĉeĥoslovakio. Tiu festivalo omaĝos al la 200-jara datreveno de la naskiĝo de Ludwig van Beethoven. Ĝi okazos en la urbo Opava kaj en la kastelo Hradec, kiuj estas ligitaj kun la vivo de la granda komponisto. En la programo : teatra prezentado en esperanto, koncerto el verkoj de Beethoven, ekspozicio, prelego, ekskurso. Dato : 3-a ĝis 6-a de julio.

A.- De la 5-a ĝis la 11-a de julio okazos la 8-a Somera Esperanto-Universitato en Gyula, Hungario. En la programo ni vidas, ke estos prelegoj pri la muzikisto Béla Bartok, la hungara

Manifestacioj ĝis aŭgusto 1970
Claude Gacond, 342-a radioprelego, 1970.04.29 & 05.02

departemento Bökös, la pentristo György Kohan, la folkloro skulptado, V. I. Lenin, la celoj de la moderna geofiziko, Shakespeare, la unuaj internaciaj lingvoj, Dante kaj la astronomio, la esperanto-movado. Dato : 5-a ĝis 11-a de julio.

Cl.- De la 17-a ĝis la 30-a de julio okazos la 2-a Internacia Ferio ĉe Lago Balaton, Balatonszemes, Hungario.

A.- La 19-an de julio malfermiĝos la Internaciaj FERIAJ Esperanto-Kursoj en Helsingör, Danlando. Ni konsilas tiujn kursojn al ĉiuj komencantoj, kiuj deziras rapide progresi, ĉar ni povis konstati, ke ili estas efikaj. Dato : 19-a ĝis 26-a de julio.

Cl.- De la 25-a ĝis la 30-a de julio okazos Internacia Konferenco pri Komenski aŭ Comenius en Přerov, Ĉeĥoslovakio. El la riĉa kultura programo ni mencias : interkona vespero, prelegoj pri Komenski pioniro de lingvo internacia, pedagogo, socia reformatoro ; ekskursoj al la naskiĝloko kaj agad-lokoj de Komenski, reciproka informado de la kongresanoj. Dato : 25-a ĝis 30-a de julio.

A.- De la 26-a de julio ĝis la 8-a de aŭgusto okazos en Svislando labor-restadejo de Internacia Civila Helpservo, kie esperanto estos instruata ĉiutage dum du horoj. Ni havos la honoron gvidi tiun kurson laŭ aŭdvidaj rimedoj. Estas loko por du esperantistoj, kiuj estas pretaj partopreni ĉiutage 6-horan manlaboron : pavimado de vojoj en internacia sportejo. Ili povos lertiĝi en la aŭdvida instruado de esperanto. Dato : 26-a de julio ĝis 8-a de aŭgusto.

Cl.- En julio kaj aŭgusto okazos la rondvojaĝoj organizataj de Esperanto-Turismo. La aŭtobusa rondvojaĝo « Noktomeza Suno » vizitos Skandinavion, de Kopenhago ĝis Hamerfesto kaj Nordkabo. Ekveturoj el Kopenhago je la 11-a de julio kaj 20-a de aŭgusto. Daŭro de tiu vojaĝo : 21 tagoj. Ankaŭ la rond-vojaĝo « Adrio-Akropolo » ripetiĝos du fojojn, ekveturante je la samaj datoj el Ljubljana, Jugoslavio. Ĝi vizitigos Jugoslavion, Bulgarion kaj Grekion, kaj finiĝos en Primošten. La vojaĝo « Oriento Vokas » okazos nur unu fojon per aviadilo kun ekveturo el Beogrado je la 6-a de julio kaj reveno je la 3-a de aŭgusto. La ĉefa celo de la vojaĝo estas la Mond-ekspozicio en Osaka. Tiuj rondvojaĝoj estas organizataj de Esperanto-Turismo, Beogrado.

A.- Ĉiam por la monato julio ni menciis la Kongreson de Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu okazos en Augsburg, Germanio, de la 25-a ĝis la 31-a de julio, kaj la Instruistan Internacian Konferencon, kiu okazos en Maribor, Jugoslavio. En ambaŭ manifestacioj estas interesa kultura, kunvena kaj ekskursiva programo.

Cl.- Vi konstatas, kiel multaj kaj interesaj estas la esperantistaj manifestacioj. Profitu pri ili.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-